



SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

2-a Kvaronjaro 1982

N° 83

ANTVERPENO

UEA KONGRESO Julio - Aŭgusto

ANTAŭ - KONGRESA VIZITO al ANTVERPENO

La 23-an de januaro 1982 okazis en ANTVERPENO solenado pri la 75-a datreveno de la loka E-a Grupo, "La Verda Stelo", kreita en 1907. Al tiu ĉi jam festinda okazo aldonigas la plezuro, eĉ la fiero, por jubileantoj, tion fari en la bela lokalo de la ĵus aĉetita E-a Domo Antverpena, 140, Frankrijk lei (Avenuo de Francio), unu el la ĉefaj bulvaroj de la granda havenurbo. Dank'al Fonduso Holder, de U.E.A., tiu grava akiro estis plenumita antaŭ nelonge. En la vastaj keloj kaj teretaĝo laboras la uloj kaj maŝinoj de la Grafika Centro de UEA. La unua etaĝo estas luita al la "Verda Stelo", kie sindonemaj ges-anoj bele aranĝis tute taŭgan kunvenejon kun trinkejo, salono kaj eĉ eta kuirejo. Ĉe la subtegmenta ĉambro oni nun aranĝas lokalon por la gejunuloj. La tuta domo, kiu ja estas tute sana sed malnova konstruaĵo, estis renovigita dank'al la laboro de la geklubanoj.

Tial ke mi tiutempe estis en Bruselo, ĉe la filino, mi decidis viziti la Antverpenajn amikojn tiun sabaton, kaj estis varme akceptita de la Prezidanto, S-ro DURWAEL, vigla kaj agema klubestro kaj instruisto. Post mallonga promenado ĝis la urbdomo, kaj ties bela placo, kun konstruaĵoj el la 16a kaj 17ajc. tre bele konservataj ĝis la nuna tempo, ni estis akceptitaj en la Urbdomo de la skabenino pri Kulturaj Aferoj, nome de la urbestrino. (Sajnas, ke la virinoj ne restas post la viroj en tiu ĉi urbo!). Entute ni estis bona trideko da personoj, el kiuj mi rekonis S-ron D. MASTERMAN, oficisto de UEA kaj Ges-roj KEHLET. Li estas bone konata eldonisto pri esperantaĵoj (MONATO kaj libroj) kaj ŝi estas estraranino de UEA; tre agema paro en nia movado.

Post honor-ĉampano el unu el la plej bonaj markoj kaj malavare disdonita, kaj parolado de la skabenino, kiu rememorigis al la ĉeestantoj la ĉiam bonajn rilatojn, kiuj pasintec ekzistis, kaj ankoraŭ ekzistas hodiaŭ, inter la urbaj instancoj kaj la "Verda Stelo", S-ro DURWAEL resumis en E-o el la nederlanda kaj mem dankis nome de la grupo kaj E-a movado. Venis la momento viziti la grandajn salonojn, kies riĉaĵoj artaj estas vere vidindaj. Se foje vi troviĝos en Antverpeno, vi certe ne domaĝos la viziton.

Je la 13-a ni reiris al la E-a Domo, kie nin atendis sandviĉoj ĉiaspecaj, biero, kafo kaj teo. Posttagmeze, ni denove vagadis tra la malnovaj kvartaloj, sub la klera gvidado de S-ro DURWAEL. Lernantino el la elementa kurso tre bonis legis por ni la informojn pri la vizitataj stratoj kaj monumentoj. Je la 5-a, ĉiuj rekuniĝis ĉe la klubejo, por aperitivo kaj formala alparolo de la Prezidanto, kaj rememoroj pri la pasinta vivo de la klubo kaj esperoj pri la estonteco. Iom pli malfrue en la vespero okazis

PERPIGNAN : FEDERACIA KONGRESO

(9-an de majo 1982)

Ni dankas al nia Federacia Prezidanto, S-ro LLECH-WALTER, kaj liaj helpantoj pro la sukcesa kaj agrabla disvolviĝo de la kongreso.

Sabaton vespere, afabla akcepto estis organizita en la salonoj de "Centre culturel Catalan". Tie tridekon de parteprenantoj regalis unue, S-ro BEAU, el AIX en PROVENCE, per lumbilda vojaĝo al la miriga insulo MALTO, kaj due, la muzikistoj kaj kantistoj de la "Gajaj Trobadoroj", direktataj de S-ro LLECH-WALTER mem.

Ankaŭ la laborkunsidoj, dimanĉon matene, kaj la simpatia komuna tagmanĝo, kaj la posttagmeza instrua vizito de la "Casa Pairal" (kiun oni malfermis por ni kaj kie gvidis nin la klera muzeestro mem), estis kontentige vizitataj de samideanoj el ĉiuj partoj de nia Federacio krom de Lozero; la foreston de nia S-ano HENIN ni tre bedaŭris; al li kaj lia familio ni esprimas niajn simpatiojn pro la sortobato kiun ili suferis.

Multaj katalunaj samideanoj plezurigis nin, partoprenante en ĉiuj niaj kunvenoj.

(C.H.M.)

PROTOKOLO de J. AMOUROUX

GENERALA KUNVENO : 9^a de majo

S-ro LLECH-WALTER malfermas la kunvenon, kiun ĉeestas pluraj samideanoj el la transpirena flanko de Katalunio.

Pro la aĝo sed ne urĝige, li anoncas sian intencon forlasi la prezidantan postenon de la Federacio. La demando estas resendita al la aŭtuna federacia laborkunsido.

Finiĝis la mandato de Ges-roj FRUS, HENIN, LLECH-WALTER kaj VIERNE. Krome, pro transloĝiĝo en Parizo, F-ino BONY eksigis. Ŝin ni bondeziras esperante, ke ankaŭ tie ŝi tiom bone laboros por E-o. Rekandidatiĝas la kvar antaŭaj postenuloj al kiuj aldoniĝas S-ro MAURIN el Montpellier por anstataŭi F-inon BONY kaj S-ro BORQUE por reprezenti Carcassonne.

Je la fino de tiu ĉi protokolo troviĝas la necesaj informoj por la landa kongreso en Orléans.

Konsiderante la financon situacion de la Federacio ni decidis donaci 300,00 F por la kaso de la "Klubo 87". Ni krome rezervas 200,00 F por helpi al starigo en Carcassonne pri kies klopodoj raportos S-ro BORQUE (6, Rue Pablo Neruda - 11000) dum la aŭtuna laborkunsido, kiu okazos en Narbonne la 3-an aŭ la 10-an de oktobro.

Principe la venontjara federacia kongreso okazos en Carcassonne.

-:-:-:-

D-ino VIERNE sin demandas pri la sekvoj kaj efiko de la kampanjo de UFE per disvendo al grupoj de flugfolioj "Premier rendez-vous avec la langue internationale". Reeĥoj ŝajne estas nulaj malgraŭ sufiĉe altaj monelspezoj.

Pli pozitiva ŝajnas esti la uzo de la "Verda Libreto" de UFE. Ĉu reeldono estas planata ?

Bondezire salutas reprezentantoj de Kataluniaj grupoj : Sabadell, Girona, Barcelona, Manresa, Vilanova i la Geltru.

Necesaj informoj : por la landa kongreso en Orléans.

Rajtis voĉdoni : 54 - Voĉdonis : 26 - Ne validaj : 2

Validaj : 24

Rezultoj :

Agadraporto UFE : jes : 23 Sindeteno : 1

Financa raporto UFE : jes : 24

Buĝeto 1982 : jes : 24

Komitato de UFE : estas indikataj la aproboj kaj la forstrekoj

tiuj lastaj (...).

J.P. Boulet : 21 (3) - S. Bourot : 23 (1) - J.P. Danvy : 21 (3)
A. Debertonne : 23 (1) - R. Despiney : 23 (1) - M.T. Liouville :
22 (2) - D. Luez : 12 (12) - P. Morin : 20 (4) - J.A. Rousseau :
24 .

Reprezentanto de la Federacio en Orléans : S-ro LLECH-WALTER

Kongresa Rezolucio por repreni en Orléans kadre de la landa kongreso :

" Les participants du congrès annuel de la Fédération d'Esperanto "Languedoc-Roussillon réunis à PERPIGNAN le 9 mai 1982 demandent ~~ins~~ ~~amment~~ à la majorité parlementaire et au gouvernement de prendre en compte les promesses faites par Monsieur MITTERRAND, Président de la République, lors de la campagne pour l'élection présidentielle en 1981, sur la base des propositions de loi n° 1667 et 1550 tendant à admettre l'Esperanto comme langue à option dans les examens au même titre que les langues régionales."

(Unuane aprobita)

Kongresa Rimarko : Ĝis nun la nova kotizkolekto -rekta pago al UFE- malfaciligas la varbadon kaj la laboron de la Federacia kaj grupa kasistoj.

A L E S : S-ro PELLETIER partoprenis la printempan piknikon en St Rémy de Provence organizita de niaj Vaŭkluzaj amikoj. Kiel kutima la etoso estis vere simpatia.

La grupo ankaŭ ricevis de Jugoslava ĝemelita urbo interesan proponon pri korespondado inter infanaj kursanoj en esperanto. Ni deziras favoran plenumon de tiu projekto al la Alesanoj.

M O N T P E L L I E R : Rememorigas al ĉiuj la internacian esperantan semajnon en SETE, de la 12-a ĝis la 19-a de septembro.

Kondiĉoj kaj aliĝo : ESPERANTO , 5 , Rue du Dr Roux, 34000 MONTP.
Jam trideko da S-anoj aliĝis.

Ni deziras bonan sukceson al la organizantoj.

N I M E S : Okaze de sia prelegvojaĝo, la 14 an de junio, S-ro TIBLEWSKI prezentis diapozitivojn pri " Pejzaĝoj de Pollando " dum publika kunveno en Kultura Centro Pablo Neruda laŭ invito de la loka asocio "Solidarité", dank'al prizorgado de nia S-ano MASSON .

La ĝenerala asembleo de la grupo, post la someraj libertempoj, okazos la 27-an de septembro je la 18-a horo.

Lasthore : Ni ĵus legas sur "Midi-Libre" (Sab. 19-a k. Dim. 20-a de junio) detalajn artikolojn pri la oficiala instruado de diversaj dialektoj, de la antaŭdeviga lernejo ĝis la universitato. Iuj kiel la Alsaca estas forgesintaj; aliaj profitas specialan atenton de nia Ministro pri Edukado (Ekz. Okcitano - eble ankaŭ la Provenca !- prave havos licenciatulojn ; sed jam Katalunoj protestas pro la ne ellivero de tiu diplomo...). Sed lasu la interesuloj debati tiujn problemojn kun S-ro Alain SAVARY kaj eltiru de tio ka unuajn konkludojn :

- 1-a : Neniu propono de leĝo, eĉ se ĝi estis deponinta, estis ekzamentita kaj diskutita de la Parlamentanoj ;

- 2-a : Do, per la vojo ne demokratia de dekretoj (mi preferus la vortojn "dekreto-leĝo"), la Supermajstro de la Universitato decidus rekte la aspektojn de sia projekto : Regiona Lingvo = Same kiel dua landlingvo ; formado de instruistoj pri dialektoj, provo enskribota por ekzameno koncernanta la konkurso en la profesio de instruisto...

- 3-a : La regionaj lingvoj ĉesos malsate lokataj en la fi-kategorio de nedivigaj lingvoj en liceoj...

- 4-a : Kion oni antaŭvidos por la malfeliĉaj lernantoj kiuj ne havis la ŝanca naskiĝi en Provinco sen loka dialekto, aŭ kiuj ne loĝas en sia denaska regiono (Bretonoj, Korsikoj) ?

Alternative, la Ministro konstruas sian sistemon kaj malfirmigas ĝin (... "L'objectif n'est pas de créer une filière très spécialisée... en clair (!) les moyens dégagés répondront, avec une légère anticipation, à la demande réellement exprimée au plan local..... Il ne s'agit pas pour le Ministère de susciter des engouements soudains pour la langue régionale... Pas question non plus de créer des spécialisations artificielles qui ne déboucheraient sur rien..... Il n'est pas souhaitable d'engager des jeunes dans une formation sans débouchés..... l'enseignement supérieur privilègera dans un premier temps ce qui existe déjà et renforcera la formation des enseignants. Mais à quoi cela servirait-il de former des étudiants supplémentaires qui ne trouveraient pas d'emplois... ce souci de réalisme et de cohérence..... cet enseignement régional sera basé sur le volontariat des élèves et des professeurs dans le respect de la cohérence du service public etc...etc....)

Ĉio elpruvas papidan kaj sen pripenseman decidon, eble pensante pri la regionaj baldaŭaj elektoj... Tial, mi devas denove konigi al ĉiuj la respondom de la Ministro (aŭ de la 3^a-Sekretario de la 5^a Sekcio de la 1^a partoficejo) al la demando de la Senatoano André ROUVIERE, 1^a Vic-Prezidanto de la Garda Ĝenerala Konsilo kaj Urbestro de Bessèges (J.O. 19.04.82 - Debatoj en Senato) :

Enseignement de l'Espéranto

4802 .- 18 Mars 1982 .- M. André Rouvière demande à M. le Ministre de l'Education nationale s'il compte introduire dans les programmes et les examens scolaires l'Espéranto.

Réponse .- Le Ministre de l'Education nationale n'envisage pas l'introduction de l'esperanto dans les programmes et examens scolaires. En effet, l'esperanto ne correspond pas aux objectifs assignés à l'enseignement des langues vivantes, étrangères aussi bien que régionales, qui, allant au-delà d'une simple transcription linguistique, comprend également l'accès à une culture et, pour les langues étrangères, à une civilisation. Or, l'esperanto, langue créée pour les besoins de la seule communication, ne correspond pas à ce souci. En revanche, l'intérêt qu'il peut susciter en tant qu'outil de communication facilitant et améliorant les rapports à travers le monde entre les hommes de toutes origines n'est pas méconnu. C'est la raison pour laquelle il est prévu que les élèves qui le souhaitent peuvent accéder à son enseignement dans le cadre des activités socio-éducatives des établissements scolaires.

(S-ro Alain Savary praktikas bonege la arton unuigi karoton kaj bastonon !). Nia movado devas revidi sian planon favore de la enkonduko de Esperanto en Ĉiugradaj lernejoj. Sajnas ke la ministra sekretariaro ne aŭdis ion ajn pri niaj rezultatoj en diversaj universitatoj...)

H. J a n n e z (Nîmes)

C A R C A S S O N N E : Nova grupo estos organizit . Prizorgos ĝin S-ro

BORQUE. Plezure ni ricevis la Ĉi-suban kontribuon al nia bulteno de S-ano BORQUE. Dankon al li !

E S P E R A N T O , Vivanta Lingvo .

Ofte oni prezentas ankoraŭ la Internacian Lingvon Esperanto kiel artefaritan lingvon aŭ kiel rigidan ĉifran lingvaĵon. Tia opinio montras profundan malkonon de la racia kaj genia strukturo, kiu permesas al la verko de ZAMENHOF la saman evoluon kaj flekseblecon de la ia ajn vivanta lingvo, malgraŭ ke oni povas akcepti, ke ĝi estis artefarita ja la komenco de sia apero.

Oni ofte juĝas nuntempe Esperanton, eĉ inter intelektuloj, kiel lingvaĵon, kiu posedas nenian kulturon, scipovon kaj historion . Tio estas ankaŭ grava malkono, kaj kelkfoje perfida juĝo, de tiuj kiuj ne dignis studi serioze la aferon anstataŭ antaŭjuĝi ĝin.

post dudek-kvin jaroj sen kontakto kun la esperantista medio, mi persone spertis la naturan kaj vivantan evoluon de la lingvo pliriĉigita de novaj vortoj kaj esprimoj permesantaj la adapton al la modernaj kaj teknikaj bezonoj de la nuntempa komunikado.

Vortoj tiaj : "kasedo", "staĝo", "buso", "pikniki", "handikapo", "komputilo", "etoso", mi ne trovis ilin en la Plena Vortaro de la jaro 1934. Eble ankaŭ mi ne trovus multajn aliajn kiujn mi ne konas.

Aliaj novaj vortoj arkaikigis malnovajn vortojn. Nuntempe oni tendencas diri : "masklo" anstataŭ "virbesto", "femalo" anstataŭ "virinbesto", "nupta" anstataŭ "edziĝa", "konsilio" anstataŭ "konsilantaro", "ensemblo" anstataŭ "kolekto" kaj eble aliaj multaj novaj vortoj.

Finfine, la konstanta uzado de la finaĵo "io" estis akceptita por formi la nomojn de kelkaj landoj. Tiel, oni povas korekte uzi "Francio", "Germanio" anstataŭ "Francujo", "Germanujo". Ankaŭ kelkaj esprimoj akceptitaj de la uzado estas permesataj kaj tiel oni povas diri: "sidiĝu" anstataŭ "sidiĝu vin" aŭ eksidu" ; "la tago leviĝas" aŭ "la tago sin levas".

Konante tiun evoluon, kiu aŭdacus sincere aserti, ke la Internacia Lingvo ne estas sufiĉe fleksebla kiel estas ĉiuj vivantaj lingvoj ?

Koncerne la historio kaj kulturo de la lingvo, sufiĉas konsulti la Internacian Muzeon de Esperanto en VIENO, la arkivojn de la landaj Kulturaj Esperantistaj Centroj kaj de la multaj Esperanto-Asocioj tra la mondo en kiuj oni povas trovi ĉiajn dokumentojn, gazetojn, revuojn, verkojn originalajn kaj tradukitajn, ktp... depost la kreado de la lingvo en la jaro 1887, tio estas baldaŭ cent jaroj !

- - - - -

B E Z I E R S : Dum la Federacia Kongreso en Perpignan, F-ino TERRAL denove regalis nin per ektemporala traduko de poemo sia, pro kies franclingva verkado ŝi estis premiita.

K R I S T N A S K O !

Kvazaŭ alvoko sonas la vorto	! Nur dum la daŭro de la nokto,
En la malvarma decembra nokto.	! Mi estis la kristnaska patro
Kristnasko !	! Kristnaska patro sen glitilo
Bela tago, brila kiel suno	! Sen blanka barbo, nek mantelo,
Ĉe la sojlo de vintro griza.	! Sen iu korbo sur la dorso;
Kristnasko !	! Mia nura pakajo :
Ĝi estas travivinda festo	! Kelkaj revoj ĉe mane...
Kiu redonas infananimon.	! Mi estis la Kristnaska paĉjo
Por la feliĉo de la infanoj,	! Kaj disdonis strangajn donacojn
Mi faris nekutiman songon...	! Al ĉiuj infanoj de l'mondo :

Al infano eskima, la kanton de cikado ;
Al infano sahela, la kristalon de fonto ;
Al infano bohema, la plaŭdeton de ondoj ;
Al infano islanda, la lilian parfumon ;
Al infan' izraela, iun negan steleton ;
Al infano ĉilia, la flugon de kolombo ;
Al la nigra infano, la blondharajn bukletojn...

Ĉiuj ricevis sian apartan revon.

Mi vidis diamantojn en feliĉaj okuloj...

Poste, sen bruo, silente mi foriris,

Tia unu el la tri reĝoj

Sur blanka nuboj !

(fino de la unuapaĝa artikolo : VIZITO en ANTVERPENO)

...../..... la solena bankedo, kies menuo vere estis alloga. Bedaŭrinde, mi devis esti en Bruselo je la 7-a kaj foriris, maltrafante la plej bonan momenton de l'tago !

Ciaokaze, ŝajnas al mi, ke la venonta U.K. estas en bonaj kaj kapablaj manoj.

S-ro BOUMAL (66300)

K O N K L U D O al la N U N A P E R I O D O A K T I V E C A

Ĉiuj grupoj pripensu ilian kontribuon al la septembra S.F.S. :

- projektoj, anoncoj, raportoj....sendotaj al S-ino MOUNIER, 17 ,Av. De Lattre de Tassigny -30000 N I M E S, antaŭ la fino de aŭgusto.
- Ĉu planinda vojaĝo ekzemple al Katalunio okaze de la Esperanta Semajno ? Ĉu antaŭviditaj "Zamenhofaj Tagoj" ?
- (La mallerta tajpanto aldonos tion : Ĉiuj niaj urboj en la Federacio Langvedoko-Rusiljono estas ĝemeliĝitaj kun eksterlandaj fraturboj = Britio, Germanio, Hispanio, Italio, kaj, mi esperas, kun Centreŭropaj Ŝtatoj -Pollando, Ĉekoslovakio, Hungario, ktp.- Dank'al la interurbaj komitatoj, multaj vojaĝoj estas ĉiujare organizataj. Ez^e mi partoprenis dufoje renkontojn en Brunsviko. Mi akceptis hejme, lastjule, miajn amikojn Berenyi, Budapeŝtanoj. Nîmes-Prago organizas interesan kaj nemultekostan dekvinon en ĉeka kaj slovaka regionoj dumsomere. Partoprenas tiujn busajn vojaĝojn multe da tria-aĝuloj (germanlingve : senioreni) kiuj, dum la vintro, provis lerni anglan aŭ germanan lingvon....rindinde rezultato ! Sed bonega rimedo por propagandi nian komprenilon, precipe kiam oni sukcesas renkonti gesamideanojn !)
- Demando : Ĉu povus konigi al ni vian propran eksperimenton ? Dankon !
- Ĉar ĉe ni ankaŭ finiĝas per kanzonoj, jen :

LA FONT ' de N I M E S .

- "Fantazia, tre libera traduko de la fama okcitana kanto : "QUE CANTE" fare de nia estimata S-ano R. LAVAL (VALO).
- "La unua strofo de Gaston PHOEBUS, en pirenea dialekto, mi transkribis laŭ la Mistrala grafio" (Valo)

A quères montinhos qué tal aùtos soun
M'empachèn de bésé mais amours ount soun.
Qué canté, Qué récanté, Cante pas per iou.

- "Mi daŭrigis per la unuaj strofoj de la "Font' de Nîmes" (Valo

Ĉi roka murego, tiel alta mont',
Kaŝas l'amatinon tie for ĉe l'font'.

R.: Mi kantu kaj rekantu, kantas ne por mi,
Sed por l'amikino en proksim' al mi.

Ĉe la font' de Nimo migdaluj' en flor'
Portas florojn blankajn kiel neĝ' en glor'

El ĉiu floro blanka igos bela frukt'
Por plenigi poŝojn de bubar' en lukt'.

(I) Sur plej alta branĉo sidas bird' amik',
Tutan nokton kantas, tamen ne por mi.

R.: Ĝi kantu kaj rekantu, kantas por mi,
Sed por l'amikino tie apud mi .

- (I) Por la ritmo estus pli bone : "Sur branĉo plej alta" (Valo)



Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 2^{ème} Trimestre 1982

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nîmes